

# Fländra **ESPERANTISTO**

**TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA**

Orgaan van de **VLAAMSE ESPERANTISTENBOND**, St. Klaradreef 59, BRUGGE  
Postrekening 2321.50 van V. E. B. Raapstr. 74, Gent

Verschijnt maandelijks  
Drie en twintigste jaarg.  
Nummer 10 (264)  
**OKTOBER 1956**

**LIDMAATSCHAPSGELDEN:**  
Leden: 100 F (met inbegrip van het bondsorgaan)  
Steunleden: 150 F (idem)  
Inwonende leden: 25 F (met inbegrip van „De Esperantist“)  
Jongeren (onder de 21 jaar): 50 F

**ABONNEMENTEN:**  
België: 75 fr.  
Ceteraj landoj: 75 bfr.  
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

## PICTO, Nova Pasigrafio

En la numero de la 1-a de septembro 1956 de la nederlanda semajna revuo PANORAMA, la redakcio publikigis longan artikolon verkitan de S.ro Mag. J. Klaarenbeek pri nova pasigrafio, eltrovita de la nederlandano S.ro Janson el Wassenaar. La titolo de la artikolo estas: „Picto, kent geen grenzen” (Picto, ne konas limojn.)

Ne estus por ni motivo skribi pri ĉi tiu nova pasigrafio, ĉar ni esperantistoj ja scias tre bone, ke ankaŭ en la pasinteco jam aperis diversaj pasigrafioj, kiuj fakte havis neniam praktikan valoron, se en la nomita artikolo ne estus io dirita ankaŭ pri Esperanto, kion ni ne povas ne kritiki.

La leganto juĝu mem. Ni citas en esperanta traduko.

„La ideo krei novan lingvon, kiu estus komprenebla por ĉiuj popoloj de la tero jam okupas multajn sukcesoj. Oni rakontis al ni, ke la nombro de artefaritaj lingvoj estas proksimume 300. La kreaĵo de D.ro Zamenhof, kiun ni nomas Esperanto ankoraŭ plej bone sukcesis. La revo de la eltrovinto tamen ne plenumiĝis, mond vasta disvastigo ne okazis.

„Kaj tio estas tre bone komprenebla, diris S.ro Janson, la eltrovinto de „Picto”. Vi povas diri, kion vi volas sed Esperanto restas malfacila. La maniero en kiu la vortoj en tiu lingvo formas frazojn estas tute bazita sur la malnova latino kaj do multe pli komplika ol tiu de la plej multaj ne-eŭropaj lingvoj.”

Laŭ nia opinio, ĉi tiuj paroloj de S.ro Janson tre klare montras, ke li scias absolute nenion pri Esperanto nek pri la esperanto-movado en la tuta mondo. La revo de D.ro Zamenhof ne realiĝis!!! Tion oni kuraĝas diri en tempo, kiam ĉiutage Esperanto estas disaŭdigata per la radio; kiam ĉiujare internaciaj esperanto-kongre-

soj estas aranĝataj en kiuj partoprenas miloj da personoj el pli ol 30 landoj; kiam Esperanto estas instruata en multaj lernejoj en la tuta mondo; kiam UNESKO akceptis la konatan rezolucion kaj Universala Esperanto Asocio akiris konsultativan pozicion ĉe UNESKO; kiam ..... sed ni ne daŭrigu, la faktoj jam parolas por si mem. En 1954 okazis nia Universala Kongreso en Harlema, en la tuja proksimeco de la loĝloko de S.ro Janson, ĉu li ne aŭdis aŭ legis la plej malgrandan sciigon pri tio?

Esperanto estas malfacila, la vortordo baziĝas sur la malnova Latino, asertas S.ro Janson. De kie li prenis tiun saĝecon? Se tio estus vera, kial ekz. Japanoj lernas Esperanton sesfoje pli facile ol iun ajn okcidentan lingvon? Estas ne ĝuste tial ĉar la vortordo en Esperanto estas simpla kaj logika kaj ĉar ambaŭ lingvoj apartenas al t.n. aflutinaj lingvoj?

S.ro Janson jam revas pri tio, ke lia sistemo estos uzata en internaciaj kongresoj en kiuj la paroladoj estos montritaj per projekcia aperato sur ekrano por ke ĉiuj ĉeestantoj povu „legi” ĝin laŭ ĉies gepatra lingvo! La sistemo konsistas el proksimume 300 diversaj signoj kun 12 akcesoraj signoj por kiuj oni povas esprimi ĉion kion oni volas. Ni, ni lasu al S.ro Janson sian revon sed ni timas ke ĝi ne baldaŭ plenumiĝos.

F. Weeke.

## La Nova Estraro de U.E.A.

En la Universala Kongreso de U.E.A. en Kopenhago estis elektata nova estraro, kiu konsistas nun el jenaj personoj:

Prez. Prof. D.ro G. Canuto, Italujo.  
Vic. Prez. S-ro P. M. Mabesoone

Nederlando

Vic. Prez. S-ro H. Holmes, Britujo  
Gen. Sekr. Prof. D.ro I Lapenna.

Membroj D.ro Inĝ. G. Azzi, Italujo.  
S.ro R. Llech Walter, Francujo  
D.ro W. Herrmann, Germanujo.

Laŭ sciigo de S.ro A. W. Withoos, Sekr. de la L.K.K., Viottastr. 11, Eindhoven okazos en 1957 la

## BENELUKSA ESPERANTO-KONGRESO

en la lumurbo *EINDHOVEN*, Nederlando.

Pliaj informoj sekvos en venontaj numeroj.

## Tero el Akvo

Kara gelegantoj, ne opiniu, ke la titolo aludas ian fabelon. Tute kontraŭe, ĝi estas vera realaĵo, kiu post la 13a de septembro 1956 pli kaj pli evidentiĝos, ĉar en tiu dato je 9 minutoj post la 13a horo, oni fermis la lastan truon en la 90 kilometrojn longa digo ĉirkaŭ la venonta poldero „Orienta Flevolando”, kiu estas parto de nia fama Suda Maro. 15 minutojn post la 16a horo en la sama tago ŝia Regina Moŝto Juliana ekfunkciis la grandajn pumpilojn grupigitajn en tri konstruaĵoj nomitaj Wortman, Colijn kaj Lovink. Ĉi tiuj pumpiloj de nun seninterrompe laboros por forigi la akvoamason kiu troviĝas interne de la ĉirkaŭanta digo kaj kiu havas surfacon de 54200 hektaroj. La kapacito de la pumpiloj kune estas 4000 M3 en minuto t.e. la pumpiloj en ĉiu minuto forigas 4000 M3 da akvo kun la sekvo ĉiutage la akvonivelo malleviĝas unu centimetron kaj daŭros proksimume ok monatojn antaŭ ol ĉiom da akvo estos forigita kaj aperos la seka grundo. Post tio povos komenci la preparaj laboroj por la kulturado de la grundo. Jam nun oni fosis tiucele longajn kanalojn en la fundo por ke la lastaj restoj de la akvo povu facile aflui al la pumpiloj kaj kiam poste la tero iom sekigiĝis oni komencos fosi la sulkojn por la drenado por ke ankaŭ la akvo kiu troviĝas pli profunde en la tero povu forflui. Sed ankaŭ poste, estas necese, ke eventuala tro-

(daŭrigo p. 5)

## El la Loglibro de Gerrit de Veer

*tradukita el la originala malnovnederlanda lingvo de K. Ruig.*

*Enkonduko originale verkita en Esp. de K. Ruig.*

En 1555 naskiĝis Willem Barentsz. sur la nederlanda marista insulo Ter-schelling en la vilaĝo Formerum.

Willem Barentsz studis la navigacion.

Li partoprenis la vojaĝojn en 1594, 1595 kaj 1596 por trovi nordorientan vojon al Indio. Antaŭe li partoprenis kiel ŝipestro 2 tiajn vojaĝojn, „vojaĝojn al Cinio”, kiel li mem diras.

La vojaĝo en 1596 fariĝis lia lasta.

Kune kun Jakob Heemskerck, la ŝipestro, li partoprenis kiel navigisto kaj scienca gvidisto la vojaĝon kiu fariĝis fama pro la travintrado sur Nova-Zembla. Ili travintradis tie en la „Behouden Huys” (Sendanĝera Domo), konstruita el ligno de ilia ŝipo kiu englaciĝis.

Post la polusa vintro, dum la revojaĝo en boato, Barentsz mortis.

La ŝipano Gerrit de Veer priskribis la vojaĝojn kaj la travintradon. Tiu-ĉi verko famiĝis sub la nomo „la taglibro de Gerrit de Veer”.

La 14-an de junio 1597 la ekspedicio forlasis la travintrejon per memkonstruita boato kaj bargo.

Ni nun donu la parolon al Gerrit de Veer.

„..... La 14an de Junio, matene je la orienta. Suno (4h. 30 m. a.m.) ni forvelis en Difavoro de la lando de Nova Sempla kaj la eterna Glacio per niaj bargo kaj barko por okcidenta vento, kaj al direktis o.n.o. 1) kaj velis tiun tagon ĝis Eylandts hoeck (= Insula angulo) 5 mejlojn, sed nia komenco ne estis tre bona ĉar tie ni reenglaciĝis, ĉar la glacio tie estis ankoraŭ tre abunda kaj forta, kio al ni donas ne malgrandan zorgon kaj timon. Tie estante, ni surbordiĝis kvarope por esplori la ĉirkaŭaĵojn kaj ni kaptis 4 birdojn kiujn ni trafetis per rifŝtonoj.

La 15an la glacio estis iom foriĝinta, kaj tiam ni ekvelis per suda vento kaj ŝipis preter la Hoofthoeck (kaj Vlissingher hooft (= Kap-angulo kaj Vlissingena (Flushing-kapo) en nordorienta direkto kaj poste norden ĝis Kabo de Sapiro, veturinte proksimume 13 marmejlojn kaj restis ĝis la 16a.

La deksekan ni alvenis sur la Oranĝinsulojn kie ni ekbruligis fajron. La ŝipestro falis en la akvon kaj la fluo forkondukis lin sed oni savis kaj sekigis lin ĉe la fajro. Ĉe Vshoeck (= Glaciangulo) ni reenglaciĝis kaj devis resti tie.

La 17an de Junio matene la glacio tiel amasiĝis ke niaj haroj rektiĝis

sur la haŭto, tiel terure estis tion vidi; ni ne povis savi la boaton kaj la bargon kaj ni pensis ke tio signifas nian lastan vojaĝon, ĉar ni tiel terure fordri-vis kun la drivglacio, kaj tiel ege estis kunpremitaj inter glacipecoj ke ŝajnis ke ambaŭ boatoj krevos en cent pecojn, pro kio ni alrigardis nin senespere ĉar bona konsilo estis netrovebla kaj ni ĉiun momenton vidis la morton antaŭ niaj okuloj.

Fine en tiuj mizero kaj danĝero iu diris se ni povas ligi haŭseron aŭ ŝnuron sur la glacieron, ni povas tiri la barkojn sur la glacieron por tiel eviti tujan danĝeron pro la drivglacio. Sed kvankam la konsilo ja estis bona, ĝi estis miksitita kun tiu malfacilaĵo ke ĝi enhavis vivdanĝeron. Sed se ni mem ne farus ion, estus certe, ke ni ĉiuj pereus. La konsilo estis bona, sed neniu karuĝis efektiviĝi ĝin, timante ke li estos formangegatan de polusursoj. Tamen la danĝero postulis ke oni faru ion kio estas farebla. Tial, en tia ekstrema Danĝero, mi, kiel la plej malpeza el ĉiuj, sukcesis ligi kablon sur la konstanta glacio, rampante de unu flosanta glacipeco sur alian, kaj venis tiel per la helpanta mano de Dio sur la konstantan Glacieron, kie mi alligis la haŭseron al alta monteto. Tiam tiuj, kiuj troviĝis en la boatoj, sin tiris al la landglacio kaj unu viro povis fari pli ol ili ĉiuj povis fari kune antaŭe. Kaj alveninte sur la landglacieron ni rapide elbarkigis la malsanulojn, antaŭe metinte tie kelkajn littukojn kaj alian materialon sur kiuj ili kuŝu, kaj ni malsarĝis ĉion el la boatoj kaj trenis ankaŭ la barkon kaj bargon sur la Glacieron. Per ĉio tio ni savis nin ĝustatempe el tiu granda danĝero kaj opiniis ke ni estis fortiritaj el la makzeloj del' morto, kiel estis envere.

La 18an de Junio ni riparigis kaj provizis niajn ŝipojn, ĉar ili estis tre premitaj per de la grandegaj glaci-masoj. La tutan boathaŭton ni devis kalfatri kaj stupi kaj ni povis meti diversajn gudrotukojn ĉar Dio la Sinjoro donis al ni lignon, por ke ni povu fandi Pecon kaj prepari ĉion necesan. Poste kelkaj el ni iris enlanden por serĉi ovojn, ĉar la malsanuloj tre sopiris ilin; Sed ni ne povis trovi ilin nur trovis ni kvar birdojn, sed ni sukcesis nur kun vivdanĝero, inter glacio kaj tero, ĉar ni preskaŭ falis kaj ni estis en ne malgranda danĝero.

La 19an estis sufiĉe bona vetero, la vento nordokcidenta kaj dumtage okcidenta kaj w.s.w., 2) sed ni restis ankoraŭ firme ĉirkaŭfermita en la glacio kaj tute ne vidis truon, kaj ni tial ĉiam pensis ke tiu stato daŭradus kaj ke ni ne povos forŝipi, sed

malgraŭ tio ni nin konsolis ree ke Dio la Sinjoro estas helpinta nin en tute ne antaŭ-vidita momento kaj savis nin kaj ke lia brako ankoraŭ ne plimal-longiĝis, ke li ankoraŭ povus helpi nin se estus lia kara volo, kaj tion ni kredis kio donis al ni kuraĝon.

La 20an de Junio la vetero estis sufiĉe bona kaj la vento okcidenta, kaj je sudorienta Suno (7u 30 m. a. m.) Claes Andriesz. ekmal saniĝis kaj ni vidis ke li ne plu longe vivos kaj venis la ĉef-bosmano en nian bargon kaj rakontis al ni kiel status Claes Andriesz. kaj ke oni konstatis ke li ne plu longe restos ĉe ni, post kio Willem Barentsz diris: „Mi kredas ke ankaŭ kun mi ne longe daŭros”. Sed ni ne havis la supozon ke Willem Barentsz estis tiel malsana, ĉar ni sidis kune kaj konversaciis kaj Willem Barentsz legis en mia karteto, kiun mi estis farinta pri nia vojaĝo kaj ni havis ankoraŭ diversajn preparolojn unu al la alia. Fine li formetis mian karteton kaj diris al mi: „Gerrit, bonvolu doni al mi ion por trinki. Sed trinkinte li tiel naŭziĝis ke li fortunis la okulojn kaj mortis tiel neatendite rapide, ke ni ne havis tempon voki la ŝipestron el la alia barko antaŭ ol li estis morta, tiel ke li mortis ankoraŭ antaŭ Claes Andriesz, kiu mortis iom da tempo post li.

Ci-tiu morto de Willem Barentsz alportis al ni ne malgrandan malĝojon, ĉar li estis la plej grava gvidisto kaj la sola navigisto al kiu ni konfidis nin kaj kiun ni fidis. Sed kontraŭ Dio ni ne povis fari ion, do ni devis esti kontentaj.

La 21an de Junio la glacio ekfordri-vis kaj Dio donis aperturon kun ssw-vento 3); kaj je Suno n.w. la vento ekblovis el la sudoriento kun sufiĉa forto kaj ni ekpretigis nin por foriri de tie.

La 22an matene ventis el la sudoriento kaj tie jam estis sufiĉe libera akvo enmare. Sed ni devis treni la boatojn tien trans la glacieron io kio kostis grandan penon kaj laboron, ĉar unue ni devis treni la barkojn kun la enhavo trans pecegon da glacio kiu estis 50 pasojn longa, kaj tie en-akvigis ĝin kaj post tio tiri sur alian glacieron kaj tiam refoje 300 pasojn treni trans la glacieron antaŭ ol ni fakte atingis la akvon por ŝipi plue. Estante en la akvo ni Difavore ekvelis je o.n.o.-a Suno (3h. a.m.) per sufiĉa vento el la sudo kaj s.s.o. kaj ni veturis w. kaj w.j.s. 4) ĝis je suda Suno (10 h. 30 m. a.m.). ....”

Ci-tie ni forlasos Gerrit de Veer.

Post multaj aventuroj ili atingis Ruslandon kaj la 29an de Oktobro ili survelis la riveron Maas kaj atingis la 1an de Novembro de tiu jaro

(daŭrigo p. 3)



## 42-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

MARSEILLE - FRANCUJO

3—10 Aŭgusto 1957

### Unua Oficiala Bulteno

#### ĜENERALAJ INFORMOJ

**KORESPONDADO:** La oficiala lingvo de la Universala Kongreso estas Esperanto. En ĉiu korespondaĵo nepre citu vian kongresan numeron kaj enmetu internacian respondkuponon.

**POSTADRESO:** Universala Kongreso de Esperanto, 32, Cours Estienne

*daŭrigo de p. 2*

Amsterdamon. Ili ankoraŭ portis la Polusvestojn. Laŭ de Veer:

„... en la samaj vestoj kiujn ni portis sur Nova Sembla kun peltĉapoj de blankaj Vulpoj, kaj aliris al Pieter Hasselaer, unu el la eksregantoj de la urbo Amstelredam (= Amsterdamo) kiu ekipis niajn du ŝipojn, nome tiu de Ian Cornelisz. kaj tiu de nia ŝipestro.”

„Het Behouden Huys”, la travintrejo de la ŝiprompiĝuloj estis retrovata en 1871 en sufiĉe bona stato.

La konservita inventaro trovis lokon en la „Rijksmuseum” (= ŝtata muzeo) en Amsterdam.

La lasta frazo de poemo pri Willem Barentsz. en kiu oni enteksis lian devizon tekstas:

„Laŭdu Willem Barentsz kiu NE faras SEN DIO”. El ĉio evidentiĝis ke la Terschellinga devizo.” Dir bin wy fôr (= Por tio ni estas = Tial ni ekzistas) estis lia gvidstelo.

1) o.n.o. = orientnordoriento.

2) w.s.w. = okcidentosudokcidento. Ni uzas W (= Okcidento) kiel SIGNON, ne kiel literon, do same kiel X kaj Y aŭ ciferojn en la matematiko. Se ni uzas O de Okcidento ekestus konfuzon inter Oriento kaj Okcidento.

3) ssw = sudsudokcidenta.

4) w.i.s. = okcident-je-sudo. (ned.: west ten zuiden, angle: west by south).

d'Orves, Marceille I. - Francujo.

**BANKO:** Banque James Rosa, Marseille - Konto no 4851.

**RABATOJ:** Plenaĝaj aliĝontoj, kiuj estas individuaj Membroj de U. E.A. (t.e. ricevas Jarlibron) rajtas rabaton de F fr. 400. Edzino de membro rajtas rabaton de duono de tiu sumo, sed ne aliaj familiaĵoj. La rabato ne validas por gejunuloj kaj studentoj.

**MAKLERO:** Aldonu makleron de 2 % por la Banko, pagante per ĉeko en eksterlando.

#### KIEL PAGI ?

1) Pere de la Oficialaj Perantoj de la Kongreso.

2) Per poŝtmandatoj aŭ ĉekoj pagablaj al poŝtadreso de la Kongreso.

**POSTĜIRKONTO:** Groupe Esperantiste — Marseille — No 156.15.

**KOTIZO:** La kotizo restas propaĵo de la Kongreso, eĉ se la paginto ne venas. La kongresa karto estas persona kaj ne-transdonebla.

**ALIGOJ:** Ĉiam sendu la pagon kaj la koncernan aliĝilon/mendilon al

sama instanco.

3) Per Banko James ROSA, Marseille — No 4851.

4) Per ĝiro: Groupe Esperantiste, Marseille — No. 156.15.

5) Per U.E.A.

L.K.K. ne akceptas varojn aŭ librojn.

**DONACOJ:** La donacoj montras la solidarecon de la esperantista familio. Listo kun nomo de ĉiu donacinto aperos en la Kongresa Libro.

**Literatura Kaso:** Ĝi konsistigas la premiojn por la Belartaj Konkursoj.

**Blindula Kaso:** Ĝin utiligas la Blindula Kongreso.

**Adopta Kaso:** Per ĝi estas helpataj esperantistoj en nepagipovaj landoj.

**KREDITO:** Ĉiu monsumo pluspagita estos skribita je kredito de la koncerna kongresano, kiu ricevos ĝin je alveno.

**KONGRESKARTO:** Kiel kvitancon por la aliĝo, ĉiu kongresano ricevos kongreskarton. Ĝi rajtigos liberan partoprenon en ĉiuj aranĝoj de la 42-a Universala Kongreso.

**KONGRESDOKUMENTOJ:** En januaro la aliĝintoj ricevos la Duan Bultenon kun pliaj informoj pri programoj kaj kun mendiloj por loĝado kaj ekskursoj. La Kongresa Libro aperos unu monaton antaŭ la Kongreso. La kongresa insigno kaj aliaj eventualaj dokumentoj estos disdonataj en la Kongresejo.

<b>KONGRES-KOTIZOJ</b>	Ĝis 31-XII-1956	Ĝis 31-III-1957	Post 31-III-1957
Kongresano . . . . .	F fr. 2.400	2.700	3.000
Edz(in)o de kongresano . . . . .	1.200	1.350	1.500
Junul(in)o ne pli ol 20-jaraj kaj studentoj . . . . .	800	900	1.000



**NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”**

Alg. Secretariaat, schriftelijke cursussen en uitleendienst:  
 Mej. A. C. H. van der Beek, P. C. Hooftstr. 90, Amsterdam-Z.  
 Penningm.: B. J. J. Albers, Olympiaweg 69III, Amsterdam-Z. Postrek. 34563.  
 Adm. Ned. Esp.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O.  
 Boekendienst: S. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postrek. 76915,  
 Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.  
 Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.  
 Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermewuustr. 29 Badhoevedorp  
 Cefdel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.  
 Vic-ĉefd. F. Weeke, IJsseldijk 20, Diepenveen. Postrek. 822075.

**DANKLETERO**

Ni ricevis de S-ro Alan Towsey, loĝinta Jan van Gojenkade 19, Leiden, jenan leteron:

Antaŭ ol mi foriros al Aŭstralio mi tre ŝatus esprimi mian koran dankon al la nederlandaj esperantistoj — kaj ili estas multaj — kiuj montris al mi tiom da amikeco kaj gastameco dum mia restado en via lando, kaj kiuj per tio igis tiun restadon tiom pli feliĉa kaj pli ĝuebla.

Mi pensas precipe pri tiuj esperantistoj en Alkmaar, Leeuwarden, Tjerkwerd, Groningen, Apeldoorn, Amsterdam, Leiden, Den Haag kaj Rotterdam — tro multaj por nomi unuope! — kiuj tiom faris por mi, kaj mi estus tre danka al vi, se vi presigus en via gazeto ĉi tiujn malmultajn vortojn de estimado.

Vivu la nederlandaj esperantistoj.

La via sincera

Alan Towsey

Delegito de U.E.A., en  
 Parkes, N.S.W. Aŭstralio.

**LA STUDANTO**

Jen la ĝustaj vortoj de

**Ekzerco 34 A:**

1: pezas; pesi; pesilo. 2: poŝtajon; poste; postajon. 3: plaĝo; plago. 4: placo; plaĉo; 5: diskuti; displuton. 6: prujno; prunoj. 7: roso; rozo. 8: ekspozis; eksponis. 9: cirklon; cirkelo. 10: heliko (rampanta besteto, kiu portas sian „domon” spiralforman sur sia dorso; le sen-„doma” parenco estas la „limako”); helico.

Jen la ĝustaj formoj de la partici-  
 poj de

**Ekzerco 33 B:**

1: la leteron sendatan (la participo

**Niaj Ekzamenoj**

La 3-an de novembro okazos la ekzamenoj por la E-kaj M-diplomoj en Utreĥto. Oni anoncu sin kiel eble plej baldaŭ ĉe F.ino H. M. Mulder, Zilvermewuustr. 29, Badhoevedorp.

Jugoslava S.ano (juĝisto) deziras korespondi kun nederlandaj gejuristoj i.a. pri profesiaj aferoj. Tiu, kiu havas intereson, skribu al: F.ino Th. v. d. Reijen, Rijksstraatweg 90, HAARLEM.

pasiva diras ion pri la substantivo „leteron”, do bezonas la adjektivan finaĵon -a kaj krome la akuzativan formon). 2: Letero ricevita (adjektiva participo sen n, ĉar la substantivo estas subjekto de la frazo) signifas respondon (pro preseraro la n mankis; post „signifi” sekvas akuzativo) skribotan (la participo diras ion pri la substantivo „respondon”, do havu akuzativan formon; „respon- don, kiun oni skribos” = skribotan respondon aŭ respondon skribotan). 3: skribotaj leteroj. 4: plenumataj (intencoj, kiujn oni plenumas = plenumataj intencoj). 5: skribante (la frazon „eĉ dum mi ne skribas” ni povas koncizigi per aktiva participo, kiu havu adverban formon, ĉar ĝi anstataŭas adverban subpropozicion: „eĉ ne skribante”). 6: ne ricevante (= kiam vi ne ricevas; do aktiva participo adverba, ĉar mankas la subjekto; la alpensebla, logika subjekto estas tiu de la ĉefpropozicio); forgesata (ankaŭ: forgesita, sed nepre ne aktiva participo). 7: ŝatatajn kaj amatajn (participaj epitetoj ĉe la substantivo „personojn”, tial la finaĵojn j kaj n; oni povus uzi en ĉi tiu frazo ankaŭ la aktivajn participojn „ŝatantajn” kaj „amantajn”, sed tiukaze la frazo havus alian signifon: ŝatata persono = persono, kiun mi ŝatas; ŝatanta persono = persono,

**Anonco**

En la Administra Oficejo de UEA estas loko por oficist(in)o, bone konanta la lingvon kaj movadon, kapabla memstara labori. Scio pri librotenado estas rekomendo. Interesigo pri la Asocio nepre kondiĉo. Salajro laŭ kapablecoj. Logeblecoj ekzistas. Leteroj kun detalaj informoj pri kvalifikoj kaj antaŭaj oficoj al la Administranto de U.E.A., F-ino M. H. Vermaas, Eendrachtsweg 7, Rotterdam.

kiu min ŝatas; ankaŭ tian oni ne forgesas). 8: havante; ilustritan (diras ion pri la substantivo „karton”; ne „ilustratan,” ĉar oni ne ilustras, sed ilustris la karton). 9: afrankita (la komenca litero a mankis preserare; sen akuzativa finaĵo, ĉar estas objekta predikativo = bepaling van gesteldheid). 10: pagitan (la amiko jam pagis, do „pagitan”); dankante kaj estimante (nepre adverbajn kaj aktivajn participojn ĉi tie).

**NOVAJ EKZERCOJ:****Ekzerco 35 A:**

Tien, kie estas streketo, mētu la vorton *ke*, *kiu(n)*, *kio(n)*, *tio(n)* aŭ *tiu(n)*:

1: „Sinjoro, kio estas — ?” 2: „Ĉu vi aludas — librojn?” 3: „Jes, mi dezirus rigardi — librojn, — staras kontraŭ — staplo.” 4: „Bonvolu trafoliu mi — libron; mi estas certa, — ĝi plaĉos al vi.” 5: „Mi scias, — libro interesos min, ĉar mi legis recenzon pri ĝi.” 6: „Sed —, — diras recenzisto, ofte estas tre persona opinio.” 7: „Vi pravas. —, — laŭdas unu recenzisto, ne plaĉas al alia.” 8: „Jes kaj —, — ne taŭgas laŭ recenzistoj, la legantoj ofte tre ŝatas.” 9: „Mi kredas, — la recenzinto de — libro estas prava.” 10: „Mi komprenas, — estas ĝuste — libro, — vi deziras.”

**Ekzerco 34 B:**

Faru per ĉi-subaj vortoj po unu frazo, el kiu klare montriĝas, ke vi bone komprenas la signifon de la vorto:

1: Gargari. 2: Kartavi. 3: Karno. 4: Viando. 5: Fava. 6: Favora. 7: Frizi. 8: Frosti. 9: Gaso. 10: Gazo.

Ekzercojn korektotajn gelegantoj sendu (kun poŝtmarko por la resendado!) al la kompilinto de la rubriko: S. S. de JONG Dzn, Waltaweg 3, TJERKWERD (Fr.).

## SKRIBA KURSO

Sub la gvidado de Sano Vandeveld de el Gent, la koresponda kurso evoluigis ĝis la nunmomente plej aktiva servo de nia Ligo.

Sekve de du longaj artikoloj, mudele kunmetitaj, en „De Gentenaar” kaj „HET VOLK”, la novaj adeptoj alfluis, tiel rapide ke Sano Vandeveld proponis al la sekretario ĉesi dum almenau du monatoj la propagandon.

Vere ĝojiga fakto estas ke inter la novaj kursanoj estas diversaj personoj kiuj posedas universitatan gradon.

Ĉiuj ricevis jam paketon da propagandaj, kaj kelkaj dankis per entuziasma letero.

Ni komunikos la adresojn de tiuj kiuj loĝas en la agadtereno de iu sekcio al ties sekretario.

## VARBU REKLAMOJN POR LA JARLIBRO DE UEA

UEA atentigas niajn gemembrojn je la jena:

\* Estu konscia pri la unika kaj potenca reklamilo, kio estas nia jarlibro, ja aperanta kaj regule uzata en pli ol 80 landoj.

\* Per kiu alia rimedo firmaoj dependantaj de internacia publiko povas atingi ĉiujn angulon de la mondo en la sama momento?! Konvinku ilin pri ilia propra intereso!

Per belaj, modernaj, trafaj reklamoj de turistoficejoj, hoteloj, vojaĝ-entreprenoj, komercaj artikoloj ktp. nia jarlibro ricevos ĉiam pli gajan aspekton kaj fariĝos ĉiam pli interesa legaĵo.

Pro la ĝenerala altiĝo de la prezoj ankaŭ niaj prezoj devis finfine altiĝi, sed ankoraŭ ili estas el komerca vidpunkto trege malaltaj en komparo kun la tarifoj de multe malpli vaste dissendataj eldonaĵoj. Jen la prezoj:

por 1 paĝo:	865 F
por ½ paĝo:	430 F
por ¼ paĝo:	215 F

Ĉiu varbinto rajtas depreni 10 % je la ensendo de la reklamsumo. Mendojn kaj pagojn oni sendu al ĉefdelegito, peranto aŭ rekte al la Administra Oficejo. La mendoj atingu nian oficejon nepre antaŭ la 15 a de oktobro 1956.

Kia bela okazo por pliriĝi la kason de niaj sekcioj; 10 % de tutpaĝa reklamo ja estas 86,5 F! Rapidegu do, la plej ultima dato estas la 15.10.1956. Sed ĉiuj gemembroj de sekcio kapablas multe varbi en unu semajno!

## Flandra Ligo Esperantista.

**Prezidanto:** Gerard Debrouwere, Magdalenastraat 29, Kortrijk.  
**Sekretario:** Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, St.-Kruis, tel. 33445 (dum la ofichoroj).  
**Kasistino:** F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.  
**Biblioteko:** E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)  
**U.E.A. peranto:** Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.  
**Redakcio F.E.:** Drs. Fern. Roose, Ste. Klaradreef 59, Brugge.  
**Koresponda kurso:** H. Pirennelaan 25, Gentbrugge.

## ESPERANTO KURSOJ

BRUGGE kaj GENT organizis novan kurson. Bonan sukceson. Pri aliaj ni ankoraŭ ne estas informitaj. Sano Mortelmans el Gent deĵoras nuntempe en la ateneo de Bruĝo. Ni Esperu ke ankaŭ li povas baldaŭ organizi kurson, kaj transdoni la rikolton al la sekcio.

## NIA PREZIDANTO FESTAS!

La filino de Gesamideanoj Debrouwere edziniĝis al S-ro A. Pauwels la 13.9.56. Korajn gratulojn por la feliĉa paro kaj por la tiel ŝatataj gepatroj.

## „KLAVAR-PIANO-DUO”

Tiu „DUO” volonte ludas en Esperanto-rondoj kaj kluboj. Kaj..... la „DUO” ludas senpage. Do vi nun povas havi profesiajn pianistojn eĉ senpage. La „DUO” postulas nur la repagon de la vojaĝelspezoj kaj, se necese, la tranoktadon.

La repertuaro estas tre alloga!

<i>La Espero</i>	<i>F. de Mœnli</i>
<i>La Vojo</i>	<i>Fr. Moolenaar</i>
<i>La Estonto estas Nia</i>	<i>Fr. Moolenaar</i>
<i>Rusa Valso</i>	<i>S. Bortkiewicz</i>
<i>Hispanaj Dancoj</i>	<i>M. Moszkowski</i>
<i>Sonato</i>	<i>W. A. Mozart</i>
<i>Marŝo Militista</i>	<i>Fr. Schubert</i>
<i>Virina koro</i>	<i>J. Strauss</i>
<i>Country Gardens</i>	) <i>Malnovaj</i>
<i>Ladye Greenleaves</i>	) <i>anglaj</i>
<i>Shephers' Hey</i>	) <i>dancoj</i>

*k.t.p.*

*k.t.p.*

S-ro Valkenier volonte ion rakontos en Esperanto pri la verkoj aŭ komponistoj, ĉar la aŭskultantoj tre ŝatas koncizan klarigon.

Bedaŭrinde la „DUO” ne havas multajn liberajn vesperojn. Do se vi deziras inviti ilin, *skribu tuj!*

Kun koraj salutoj,

„KLAVAR-PIANO-DUO”

Maasstr. 77-III - Tel. 99559

Amsterdam-Zuid

## KORESPONDANONCO

F-ino Eva Bittnerova

Pardubice

Labska 146

Ĉeĥoslovakujo.

daŭrigo de p. 1

multo da akvo povu esti forigata kaj tial oni metas en la drenulkojn dren-tubojn kaj la sulkoj estas plenigataj per tero tiel ke sub la surfaco de la grundo troviĝas vasta reto de dren-tuboj per kiuj la akvo kvazaŭ aŭtomate povas forflui al fosajoj kaj pli grandaj kanaloj por fine atingi la pumpilojn. Laŭ la nunaj kalkuloj oni bezonos por ĉi tiu poldero proksimume 100 milionojn da dren-tuboj, kiuj kune havos longecon de proksimume 33000 K.M.

Kiam la tero estos sufiĉe seka oni komencos la pretigadon de la vojoj kaj la fosadon de pliaj kanaloj por ke oni povu facile transporti la necesajn laboristojn kaj maŝinojn. Ĉiuj tiuj laboroj apartenas al la periodo de la t.n. malfermado de la terenoj. La transformigo de la sterila, malrigida kaj malbone irebla tereno al normalaj kulturkampoj okazas pere de agrikulturaj laboroj kaj sekvanta enkonduka agrikultura ekspluatado.

Se ĉio laŭplane efektiviĝos oni povos jam en 1960 rikolti la unuan grenon kaj aliajn produktojn de ĉi tiu poldero kaj tiam Nederlando havos denove 54000 hektarojn da kulturebla grundo. Kune kun la jam tute pretaj Wieringermeer-poldero kaj la Nord-orienta poldero, kiuj respektive ampleksas 20.000 kaj 48.000 hektarojn Nederlando akiris jam 122.000 hektarojn da bona kulturebla grundo, kiu donos al multaj homoj laboron kaj nutraĵon. Sed tio estas ankoraŭ ne ĉio. Oni ja faris la planojn kaj antaŭ-preparajn laborojn por la sekigado de du aliaj partoj de la iama Suda Maro nome Suda Flevolando kaj la Markerwaard, kiuj respektive havas surfacon de 45000 kaj 56.000 hektaroj. Kiam do ĉiuj polderoj estos pretaj la nove akirita tero el akvo ampleksos entute 225.000 hektarojn. Tio estas pli ol la plej malgranda nuna provinco de Nederlando.

F. Weeke.

## BIBLIOGRAFIO

Hanna Kobylinski: „La Revolucio de Ĉinio.” El la Dana lingvo tradukis C. Graversen. Eld. SAT.

Avenue Gambetta, 67 Paris (20) 94 p. Formato 14 x 19. Prezo: 0,70 dol. aŭ 250 fr. fr.

Kiu kaj kio estas tiu Hanna Kobylinski? Bedaŭrinde ke tradukinto aŭ eldoninto ne aldonis biografian noteton. Ĉiuokaze ŝi skribis rimarkindan libreton. Ni, kiuj tiel malmulte scias pri tiu mistera lando, lernas en tre klara kaj konciza maniero, la miljaran antikvan ordon en tiu lando, poste la enpenetradon de okcident-Eŭropaj ideoj, la revoluciojn (jes, revolucioj), la nunan registemon, la rilatojn kun najbaraj landoj, kaj fine du problemojn: 1) Ĉinujo kaj UNO. 2) Formosa.

Unu tre grava manko: la verko ne niel pritraktas la religion en la nova Ĉinujo. Mi persone ankaŭ bedaŭras ke ne enestas kelkaj paĝoj pri la instruo de Sun-Yat-Sen. Li estas senescepte konsiderata kiel la patro de la nuna Ĉinujo kaj lia instruo estas interesege. La verkistino donas tro, malmulte. Estas ankoraŭ alia afero kiun mi bedaŭras; nome ke la libro ne sciigas al ni kiamaniere la revolucio efektiviĝis ĉe la Ĉina popolo. Ĝi nur diras ke ĝi „okazis proporcie sensange, kvankam tre multaj grandbienuloj estis ekzekutataj” kaj ke „linĉo estis leĝe malpermesita, sed en la praktiko estis neeviteble, ke maljusto kaj perforto okazis kontraŭ sendefendaj akuzitoj” (p. 51). Sed ni ŝatus scii ĉu tie okazis ekz. la sama kiel okazis dum la Franca revolucio. Kaj se jes (ni persone ne dubas pri tio) tiam ni konkludas al tre nigra makulo sur tiu paĝo de la Ĉina historio. Kaj oni ne rakontu al ni ke tiel aŭtoritataj gvidantoj kiel Mao-Tse Tung k.a. ne kapablis haltigi tion. Kaj same kompreneble, ni tiam emas kompari kun Hindaj figuroj kiel Mahatma Gandhi, kun lia senperforta metodo. Fine, post la legado de tiu, mi rediras, tre interesa libreto, frapas nian atenton rimarkinda paraleleco inter la okazintaĵoj en la landoj Germanujo, Italujo, Rusujo kaj Ĉinujo. Unue socia kaj politika situacioj kiuj fine ne plu estis tolerablaj. Poste renverso de la reĝimo. Poste intercivitana lukto kiuj kondukas al la potenco de unu partio kaj de unu persono. Rezulto: socia nivelo; tute ne libereco. Mi ne volas diri per tio ke ĝenerale ne venis multaj plibonigoj; sed nur ke ni estas ankoraŭ tre malproksime de la ideala homaro kaj ke la politikaj gvidantoj eble ne multe faras por atingi tiun idealon. Ankoraŭ alia penso trudas

sin al ni: kial la unuaj misiistoj agis preskaŭ ekskluzive religie (kun flegado kaj instruado) kaj ne socie? Ĉu ili ne antaŭvidis ke je la fino ili perdus? Rilate tion, oni ankaŭ ne rakontu ke tiuj misiistoj estis servistoj de fremda kapitalismo aŭ io simila. Tio estas mensogego. Ili iris tien kiel plej puraj idealistoj. Nur, eble, ili ne sufiĉe klara vidis.

Lingvaj rimarkoj: La fakto ke la literatura komitato de SAT, kontrolis la libron estas garantio pri lingva ĝusteco. Tamen mi plej forte malaprobas la troan uzon de akuzativo. La ekzemplojn „...metis la registaron antaŭ problemojn” (p. 13) „...unuigi en unu movadon la kamparanojn..” (p. 17) „...kolektis siajn revoluciuojn en unu partion..” (p. 19) „...estis kunigebla en unu nacion..” (p. 20) „...turnis sian agadon kontraŭ la armeojn..” (p. 26) „...metis antaŭ ilin..” (p. 36) mi devas absolute kondamni.

La vorto uverturo estas muzika termino kaj do ne ĝuste uzita je paĝo 30.

Fine mi bedaŭras la tielan dividon de la vorto Sove-tunio pro alia linio. Preferinde estus Sovet-Unio sen streketo.

Tre rekomendinda libro! Sed bedaŭrinde ke ĝi ne estas bindita ĉar ĝi meritas lokon en biblioteko.

NYT.

SVEDA POEMARO, tradukis Magda Craisson; 112 pĝ. 14,5 x 17,7 cm.; blua bindo kun ora titolo. Eld.: Eldona Societo Esperanto, Stockholm.

Prezo: 6 sv. kr. (f 4,50).

Per kantoj kaj poemoj oni ekkonas la animon de popolo; tial ĉiu nacia poemaro en Esperanto estas simpatia eldono, kondiĉe ke traduka tasko estu entreprenita de multflanke lerta esperantisto.

Tradukado de poemoj ja postulas pli da kapabloj ol tradukado de prozo: oni kvazaŭ trasentu la sentojn de la poeto por penetri ĝis la kerno de la poemo. Nur tiam la tradukanto kapablas esprimi la senton de la materio same aŭ preskaŭ same flue kaj glate kiel en la originalo.

La tradukan taskon de SVEDA POEMARO prenis sur sin Magda Craisson, konata ne nur en la skandinavaĵ landoj, sed ankaŭ jam internacie. Dum la legado evidentiĝas, ke laŭdaj paroloj de d-ro Szilagyí en sia enkonduko de la libro pri la tradukintino kaj ŝiaj produktoj ne estas senbazaj aŭ troigitaj. Escepte de tre malmultaj malglataĵoj, kiujn eĉ la plej sperta tradukisto ne scias eviti, la poemoj estas kvazaŭ reverkitaj en

fiua, ofte eĉ dolĉe sona Esperanto. Ne ĝenas torgaĵoj kaj krudaj vortinvertoj, tiom kutimaj en pluraj tradukitaj poemoj. Krom tio la tradukintino pruvis disponi pri admirinda arto; virtuoze ŝi scias krei belajn kaj klarajn vortkunmetojn, traplektante la tutojn per tuj kompreneblaj derivaĵoj. Malavare, sed nenie superflue, trude aŭ afekte — kiel kelkaj aliaj tradukistoj kutimas fari — ŝi scias apliki verbojn, rekte derivitajn de adjektivoj aŭ substantivoj, ekz.: *li knaras, avaras; vi senharas — pli grandas la peko — skispuri frosta forbluas dolĉas akvo klara — purpuras la diantoj — tili' en somermeza bel' almuras florfolie — kiel nego malpeze kristalas — frostklaras la ĉiel' — blu-bluas ĉielmuslin' — dum vesperhor' trankvilas — ho, dolĉas la alveno — la ter' tempestas k.plaliaj.* Trafa estas la esprimo *lun' malkreske iras*; de ritmo postulita, sed pro tio ĝuste logika *post unu alia* (anst. la kutima *unu post alia*).

Nur unu fojon la tradukintino estis devigita uzi akuzativan formon de aktiva objekto kune kun akuzativa pasiva objekto: *nin donas scion pri Di-vol'* (la ritmo ne permesis korektan uzon de *al ni*).

La poemaro ampleksas 74 poemojn de pli ol 30 diversaj poetoj, inter kiuj kelkaj ankaŭ internacie sufiĉe konataj. La elekto de la materialo kaj de la fontoj ŝajnas al mi laŭdinde farita. Kaj kvankam ne povante juĝi pri la traduka ĝusteco, mi havas senrezervan laŭdon por la tradukaj *pureco* kaj *korekteco*.

Al ĉiu amanto de sentoplenaj poemoj, kaj al ĉiu kiu scias taksu laŭvalore la flekseblecon de Esperanto en poezio, tiu ĉi poemaro estu nepre rekomendata.

G. J. D.

## ESPERANTO EN LA FILMOJ

La listo de la filmoj, en kiuj la internacia lingvo estas uzata, plilongiĝas. La filmaktoro Lew Ayres uzas tiun lingvon kaj esperas verki libron en ĝi. Tiu libro, dediĉota al la diversaj religioj en la mondo, estus poste transverkata en filmo.

Aliparte Esperanto estas uzita — en pli aŭ malpli gravaj proporcioj — en la sekvantaj filmoj: „Road to Singapore”, „Idiot's Delight”, „The Dictator”, „Neutral Port”, „The Hermit of Samburay”, „Conspiracy” kaj „Von Himmel gefallen”.

(el „Le Peuple” 28.8.56)